**At Liverpool University,** England, nine students offered Esperanto as part of their studies for a B. A. degree. Five universities throughout the world now have lectureships in Esperanto. It is taught officially in eleven others and unofficially in sixteen more.

**The international medical review in Esperanto,** "Medicina Revuo," has recently resumed publication in Japan. It is published by the Physiological Institute of Tiba University, under the editorship of Professor Masao Suzuki.

**In Asiya, Japan,** the local Unesco Association sponsored an Esperanto course during July of 1964. It was taught by Ŝinji Mijamoto, prominent local businessman.

**The International Tourist Center** in the Netherlands, has begun a series of autobus tours for Esperantists called "Karuseļvojaĝoj" (Carousel Tours). The eleven-day tour begins and ends in Amsterdam and passes through Cologne and Heidelberg, Germany; Luxembourg; and Brussels, Belgium.

**A British Esperantist,** Mrs. Doris W. Worcester, who has lived and worked for many years in Japan, recently embarked on a lecture tour of New Zealand. She was extensively interviewed by newspapers, radio and TV. She spoke before Teachers Colleges and many other schools. As a result, the Evans Bay Intermediate School decided to teach Esperanto. 285 students took part in classes this year, and an increase to over 600 is estimated for next year.

**The weekly Esperanto programs** of the Vienna Radio have had a long and distinguished history. In 1924, just after the establishment of the very first radio station in Austria, Radio Vienna began broadcasting a course in Esperanto. The programs have continued regularly since that time, except for the difficult period of World War II and for about eight months in 1954.

**The Organization of Danish Youth Hostels** has published a leaflet in Esperanto entitled *Bonvenon al Danmark kaj la danaj junulargastejoj* (Welcome to Denmark and to the Danish Youth Hostels).

**Complete descriptions in Esperanto** are being added to the large-size German language "Tierkalender" (Animal Calendar) for 1965, published by Reinsteg-Verlag in Gechingen, Germany. Approximately 35,000 copies of this calendar, beautifully printed in color, are distributed to banks, magazines, and two thirds of the schools in Western Germany.

**The firm Bénédicte** has published an international menu with 90 different dishes in six national languages including Esperanto.

**In order to graduate "cum laude approbatur"** in the Home Economics Department of the University of Helsinki, students must complete two courses in Esperanto. These courses are usually taken during the summer at the Summer University of the city of Lapeenranta, Finland. This past summer the "Fundamental Course" was given by the world-renowned teacher of Esperanto, Andreo Cseh, and the second "Economic Course" was taught by Vilho Setala. 36 students took part in the former course and 24 in the latter.

**In Israel,** the Education Department of the City Council of Tel-Aviv, sent a circular to all city schools, announcing that it was ready to organize courses in Esperanto for teachers during the spring and summer vacations.

**At the Center for Nuclear Studies** in Grenoble, France, an Esperanto section has been organized. Three essays in Esperanto were published in the early part of 1964, one written originally in Esperanto, and two other scientific studies translated from the French.

**"Korea Revuo" (Korean Review)** is the name of a new Esperanto-Korean magazine published by the Korean Esperanto Institute in Taegu. It is printed under the auspices of Chung Gu University, whose President, Dr. Hae Chung Choi, has long been an advocate of Esperanto.

**Officers and men of the U. S. Armed Forces** often find themselves facing the language barrier. These two recent comments by military men dramatically point up the need for an interlanguage: "I am now reading the book *Esperanto: The World Interlanguage* by George Alan Connor et al. I easily understand the need for an interlanguage and have experiences in this line. My family and I visited Sicily last summer with my wife's relatives and were greatly in need of a common language. We did manage to communicate, but think how much easier it would have been just by using the Esperanto language keys.... We write to Italian relatives but it is complicated having to go through interpreters. I do think these language keys would be as easy now with none of us knowing Esperanto." Major Oscar M. Belk, Jr. - "I am presently stationed in Turkey on military duty. I have heard of Esperanto and know a little of it, but I was wondering if I could obtain more information about it from you. ... I have traveled throughout Europe and will travel quite a bit more before returning to the States, and lack of facility in the native language is not only inconvenient but downright dangerous. I am a medical officer and although I am gradually gaining facility with Turkish, I am nevertheless quite apprehensive in my dealings with them. If everyone were to have a few of the experiences I have had here, we would have an international language tomorrow." Capt. Morton J. Sanet, M.D.

## LA LECIONO

*Kompilita de Doris Tappan Connor*

(*Gelernantoj evenas brue, kaj sidiĝas. La instruistino sonorigas sonorileton, kaj komencas saluti*): Bonan tagon, gelernantoj! Ĉu vi estas sanaj hodiaŭ?

*Grupo:* (unuvoĉe) Jes, instruistino, ni estas sanaj!

*Inst:* Bone! Ni havas interesan lecionon hodiaŭ. Sed, unue, permesu al mi demandi: Kio estas via nomo? (*montrante al lernantino*)

*Lilio:* Mia nomo estas Lilio Bruno.

*Inst:* Kaj kion viaj gepatroj nomas sin?

*Lilio:* Paĉjo kaj Panjo.

*Inst:* Jes, certe, sed la nomo?

*Lilio:* Nur Paĉjo kaj Panjo.

*Inst:* (*kun ĉagreno demandas al alia*) Nu . . . kio estas via nomo?

*Dua-L:* Ho, mia nomo estas la sama kiel tio de Paĉjo kaj Panjo.

*Inst:* Kaj kio estas iliaj nomoj?

*Dua-L:* Same kiel la mia!

*Inst:* Ni komencu la lecionon!

*Tria-L:* (*levas la manon kaj krias*) Instruistino! Instruistino!

*Inst:* Jes?

*Tria-L:* Ĉu vi punus knabon pro ago kion li ne faris?

*Inst:* Kompreneble ne! Kial?

*Tria-L:* Nu . . . mi ne lernis mian lecionon!

*Inst:* Heh? Do, vi estu la stultulo de la grupo. (*sidigas lin en angulon, kaj metas sur la kapon stultul-ĉapelon*) Nun . . . denove al la leciono! (*demandas al alia lernanto*) Kial la vortoj en Esperanto havas radikojn?

*Kvara-L:* (*levante la manon*) Mi scias! Mi scias! Por ke la lingvo kresku!

*Inst:* Vi ĉiu estas stultuloj! Ĉu vi scias ion pri geografio?

*Grupo:* Ho, jes . . . ni scias ĉion!

*Inst:* Nu . . . dekstre estas oriento. Maldekstre estas okcidento. Antaŭ vi

estas nordo. Kio estas malantaŭ vi?

*Grupo:* La fenestro! (*aŭ kio ajan estas tie*)

*Inst:* Iru al la landkarto de la mondo, Petro, kaj montru al ni Amerikon. (*Petro tion faras*) Tio estas ĝusta. Jen, lernantoj, diru al mi, kiu eltrovis Amerikon?

*Grupo:* Petro!

*Inst:* Heh? Ĉu vi ne memoras pri Kristofo Kolombo?

*Dua-L:* (*levante la manon*) Jes, mi scias. Li estis Italiano, kiu eltrovis Amerikon por la reĝino de Hispanujo, en la jaro 1492. En la jaro mil-kvar-cent-naudek-dua, Kolombo velveturis sur la oceano blua!

*Inst:* Tre bone! Vi estas inteligenta knabineto. Sed, nun, gelernantoj, kion vi scias pri matematiko?

*Grupo:* Ni scias ĉion!

*Inst:* Bone — Se domo havas kvar ŝtuparojn, kaj ĉiu ŝtuparo havas dek ŝtupojn, kiom da ŝtupoj oni devas supreniri por atingi la supron?

*Grupo:* Jes, certe!

*Inst:* Ne, ne — Kiom da ŝtupoj?

*Petro:* Kiom — eh — jes. Kiom da ŝtupoj? Ho, jes — ĉiujn!

*Inst:* Nu, ĉu vi scias ion pri gramatiko?

*Grupo:* Certe! Ni scias ĉion!

*Inst:* Ni nun volas fari frazojn kun personaj pronomoj — li, mi, vi, kaj tiel plu. Se, ekzemple, la Patro dirus: "Mi foriros hodiaŭ vespero," kion respondus la Patrino al li?

*Petro:* Si dirus: "Vi testos hejme!" (*la grupo ridas*)

*Inst:* Gramatike analizu la frizon, "Petro edziĝis kun Lilio".

*Dua-L:* Petro estas substantivo, ĉar ĝi estas nomo de iu. Edziĝas — estas konjunkcio, ĉar ĝi kunigas Petron kun Lilio. Kaj — Lilio estas — verbo, ĉar ĝi regas la substantivon!

*Tria-L:* (*venas de la angulo*) Instruistino, mi havas belan bildon por vi. Estas pri la Biblio.

*Inst:* Ĉu vere? Montru ĝin al la grupo.

*Tria-L:* (*montras pecon de blanka, absolute senmakulta papero*) Tiu bildo prezantas la pason de la Izraelidoj tra la Ruĝa Maro.

*Inst:* Sed, kie estas la maro?

*Tria-L:* Ĝi jam foriris!

*Inst:* Kaj kie estas la Izraelidoj?

*Tria-L:* Ili jam pasis!

*Inst:* Kaj kie estas la egiptoj?

*Tria-L:* Ili ankoraŭ ne alvenis!

*Inst:* Nu, tio sufiĉas! Vi estas optimisto!

*Kvara-L:* Instruistino, mi scias pri la optimisto.

*Inst:* Bone! Kion vi scias?

*Kvara-L:* Pesimisto kaj optimisto estis du muŝoj. Ili ambaŭ falis en glason da lakto. Pesimisto nenion faris por savi sin, kaj dronis. Sed optimisto naĝadis — kaj naĝadis — kaj naĝadis, ĝis la batado de ĝiaj kruroj faris bulon da butero. Li sidiĝis sur la butero, sekiĝis kaj forflugis.

(*La lernantoj ridas läute. La instruistino regardas la horloĝon kaj denove sonorigas la sonorilon dirante "Bonan tagon! Gis la revido!" La lernantoj starigas kaj forkuras el la ĉambro dirante la samon.*)

## PAŭLO KAJ GAŭLO

Vivis Paŭlo kaj Gaŭlo en dom' tiu sama:  
Paŭlo supre, kaj Gaŭlo malsupre loĝadis.  
Paŭl' neniu ofendis — trankvila, pacama;  
Plej sovagajn petolojn do Gaŭl' elpensadis.  
En la ĉambro li ĉasis: jen hund', jen leporo;  
Inter tabloj kaj seĝoj li pelas kaj sonas  
Kaj trumpetas kaj pafas; en ĉasa laboro,  
Kriegante, saltante, laciĝon ne konas.  
Paŭlo ĉion toleras, sed fine ne povas . . .  
Iras suben al Gaŭlo, petegi lin provas:  
"Kompatigu, sinjoro, kaj ĉasu pli mole,  
Ĉar ja supre la vitroj ekfalas senvole."  
Sed el Gaŭlo je tio: "Libera hometo en sia dometo."  
Kion je ĝi respondi? Capelon Paŭl' prenis;  
Li eĉ vorton ne pepis kaj hejmen revenis.  
Morgaŭ Gaŭlo ankoraŭ bonguste ronkadas,  
Jen nazon lian io de plafon' gutadas . . .  
Li eksaltis el lito kaj supren rapidas.  
Frap! Frap! — Fermite! Kio? Per tru' li ekvidas  
Strangajon: Tuta ĉambro estas akvoloko,  
Kaj Paŭlo sur komodo sidas kun fiŝhoko.  
"Sinjor', vi kion faras?" — "Mi kaptas fiſetojn!"  
"Sed, sinjor', mi sur kapo ja sentas gutetojn!"  
Kaj je tio ĉi Paŭlo: "Libera hometo en sia dometo."  
El fablo morinstruon vi legos facile:  
"Vi tiel al alia, li al vi simile!"

—Aleksandro Fredro (Tr. Leo Belmont)

## ANTAŬ 71 JAROJ

Jen Esperanto-letero skribita de la fama Esperanto-pioniro en Rusojo,  
Prof. A. Dombrovski, al la fama pioniro en Usono, Richard H. Geoghegan.  
Prof. Dombrovski estis en tiu tempo ekzilito de la cara registaro.

Kion vi skribis pri la sociala stato de Norda Ameriko, sajnas al mi tro  
unuflanke pentrita. Mi scias, ke la Unuigitaj Ŝtatoj ne estas ia absolute  
ideala regno. Sed mi ankaŭ scias, ke la absolute idealia regno troviĝas ne  
nie sur la globo tera. Tia regno ekzistas sole *in posse* (en ebleco), kiel  
diras la filozofoj, sed *in esse* (en realeco) ĝi eble neniam efektivigos en  
ĉi tiu mondo. La absolute idealia regno estas limo, al kiu la homaro penos  
ĉiam alproksimiĝi, sed ĝin tute atingos neniam. Tial en la homa parolo la  
la idealia regno nominda estas nur tiu, kiu el ĉiuj aliaj teraj regnoj plej  
alproksimiĝas al la idealo. Elirante el tiuj ĉi principoj, mi opinias, ke la  
*Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko oni povas nomi regno idealan, ĉar,*  
kvankam ili havas siajn malbonajn flankojn, tamen en ili ĉiu aparta homo  
posedas plej multe da rajtoj kaj ĉiu pozitiva homa forto povas tie trovi la  
necesan punkton de almeto, ĉar tie oni povas ĉiam elserĉi la konvenajn  
kondiĉojn por la utila laborado al la komuna bono de la socio....

Krom tio, kvankam la nuna ordo de via nova patrujo ne estas tute per  
fekta, tamen ĝi povas senbare perfektigi, ĉar kontraŭ ĉiuj malbonajoj oni  
povas publike paroladi kaj proponi la konformajn rimedojn por ilia tuja for  
igo, alivorte oni havas la kondiĉojn por sukcesa batalado kontraŭ socialaj  
malbonajoj, kio ankaŭ en nia "bone ordigita" Eŭropo ne ĉie estas trovebla.

Vi skribas, ke la popolamaso en Ameriko estas turmentata per riĉeg  
uloj, kaj ke la laboristoj tieaj estas ĝemantaj. Mi volonte kredas tion ĉi  
kaj tre bedaŭras. Sed aliflanke mi petas vin ekmemori, ke en nia "krist  
amema" Eŭropo ekzistas tutaj nacioj, kiujn oni sisteme pereigis kaj al  
kiuj eĉ ĝemi estas malpermessate!...

Mi konatigis kun Volapuk, kiam mi estis lernanta teologion en Kovno.  
La profesoro de la seminario, Prelato A. Voronoviĉ, montris al mi novan  
lernolibron de Volapuk. Traleginte ĝian antaŭparolon, mi estis ĉarmita, kaj  
kun grandega intereso mi komencis trarigardadi tiun ĉi "tutmondan" lin  
gvon. Sed bedaŭrinde malgraŭ tio, ke mi pli malpli komprenis 12 lingvojn,  
en Volapuk mi povis nenion kompreni, ĝis mi rigardis en la vortaron. Mia  
unua fervoro rapide malvarmiĝis....

Post tri jaroj mi konatigis kun Esperanto. Mi eksiciis pri ĝi el gazetoj,  
kiuj mokante annoncadis "ankoraŭ unu lingvo internacian." Malgraŭ tivi  
ĉi mokadon mi aĉetis la unuan broŝureton pri Esperanto kaj, trarigardante  
ĝin, tuj ekkidis, ke preskaŭ ĉio en ĝi estas por mi komprenebla sen ia ler  
nado. Ju pli mi ĝin lernis, des pli mi konvinkiĝadis, ke tiu ĉi sistemo es  
tas inda farigi lingvo tutmonda. Mi rakontis pri Esperanto al kelkaj el miaj  
kolegoj en la akademio, kaj ili tute konsentis kun mi. De tiu tempo mi far  
iĝis Esperantisto. Mi trovis en Esperanto preskaŭ ĉiujn ecojn, kiujn devas  
havi lingvo tutmonda: facilecon, naturecon, bonsonecon, uzeblecon, por  
ĉiuj celoj— ne sole por komerco, sed ankaŭ por la scienco kaj por la po  
ezio. Krom tio mi trovis, ke ĝi estas vere filozofie konstruita....

El via letero mi vidas kun plenlumo, ke via opinio pri Esperanto estas  
la sama, kvankam vi alvenis per alia vojo ol mi al tiu ĉi opinio.

— A. Dombrovski

# KION NI MANGU?

(Amuza studio pri vortoriginoj en Esperanto)

Kiel la nomoj de niaj vestoj, tiel ankaŭ la nomoj de niaj mangajoj kaj trinkajoj montras, ke nia civilizo estas tutmonda. Ĉiuj kontinentoj alportis novajn vortojn al la lingvo de Okcidenta Eŭropo kaj tiel al Esperanto.

La indianoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko pliriĉigis la civilizitan mondron per multaj gravaj vortoj, ekz. *maizo*, *tomato*, *kakao*, *čokolado*, *tapiroko*, *manioko*, *kasavo*. Kiom da bongustaj fruktoj havas indianajn nomojn! La suka *ananaso*, la dolca *papajo*, la acide dolca *guavo*, kies gelatenajo estas ŝatata frandaĵo, la aromriĉa *persimono*, la *avokado*, el kiu oni faras bonan salaton, estas fruktoj de la Nova Mondo, kion pruvas iliaj nomoj.

Multaj fruktoj indikas originon per siaj nomoj, *Persiko* kompreneble venas el Persujo, *čerizo* el la regiono de Cerasus, en Azio, *cidonio* de Cydonia, en la Insulo Kreto, *kaštano* de Kastana, ĉe la Nigra Maro. *Banano* estas afrika, *jujobo* araba, *mango* malaja. *Melono* estas greka, *abrikoto* araba, *pomo*, *piro* kaj *nukso* latinaj vortoj. *Pruno* estas greka. *Suko* estas sanskrita (hindia), *sukero* kaj *siropo* estas arabaj vortoj.

*Orango* estas araba, *pampelmo* malaja, *kumkvato* ĉina, *mandarino* sanskrita, *limedo* persa, *bergamoto* turka, kaj *citrono* greka vorto. Ŝajnas do, ke ĉiu el la citrus-fruktoj havas ailingvan originon. La Esperanto-vortaroj estas sufice konfuzaj pri la nomoj de tiuj fruktoj. Nur *oranĝo* kaj *citrono* estas oficialaj vortoj, *bergamoto* estas Zamenhofa, *mandarino* troviĝas en Plena Vortaro, *pampelmo* kaj *limedo* en Edinburgh-Vortaro, *kumkvato* nenie. Tial jen listo kun la botanikaj terminoj (latinaj) kaj la anglaj tradukoj:

pampelmo	Citrus decumana	grapefruit
oranĝo	Citrus sinensis	orange
bergamoto	Citrus bergamia	bergamot
mandarino	Citrus nobilis	tangerine
citrono	Citrus medica	lemon
limedo	Citrus limetta	lime
kumkvato	Citrus aurantium	kumquat

Rizo estas sanskrita, *spinaco* persa, *saguo* papua kaj malaja, *cepo* kaj *fabo* latinaj, *pizo* kaj *petroselo* grekaj vortoj. *Puding* estas kelta: *Pipro* kaj *zingibro* estas sanskritaj, *cinamo* hebreia, *mento* kaj *timiano* grekaj.

El la baska lingvo venas *ančovo* (*anchova*, "seka"), el la islanda lingvo *baringo*. *Sardinoj* kaj *sardeloj* estis unue kaptitaj ĉe la Insulo Sardinio.

Ni finu per kelkaj rimarkoj pri trinkajoj. *Kafo* estas araba kaj turka vorto, *teo* venas el la ĉina lingvo, *kolao* estas afrikdevena, *lakto* greka, *kremo* latina. Kvankam la Profeto Mahometo malpermisis al siaj anoj la trinkadon de alkoholo, la araba lingvo donis al ni la vortojn *alkoholo* kaj *arako*. *Julepo* estas persa vorto, kaj *gia* unua signifo estis rozakvo. *Rumo* estas amerik-indiana vorto. La latina origino de *likvoro* estas evidenta. *Vino* estas de greka, *biero* de germana origino. *Brando* ankaŭ estas germana ("brulita" vino), kaj *gino* estas mallongigo de juniperbrando. *Grog* venas de la ŝercnomo de la brita admiralo Vernon, kiu vivis antaŭ 200 jaroj; *viskio* venas el la gaela lingvo (*uisgebeatba*, "viv-akvo").

— W. S.

## ESPERANTA KRONIKO

**Esperanto-Kurso en Altlernejo, Akron, O.** – Dank' al la entuziasma organizado de S-ino Sandra Kent, kiu instruas la anglan kaj francan lingvojn en publikaj lernejoj de Akron, nova Esperanto-kurso efektivigis en altlernejo. Komence, dek-sep geknaboj el la 10-a, 11-a, 12-a studjaroj partoprenas en la kurso ĉiu-vendrede. Ĉiuj lernantoj havis bonan preparon por la kurso pro diversaj studioj de lingvoj en la lernejo, ekz. la latina, franca, hispana, germana; kaj lingvoj en la hejmo, ekz. greka, turka, hebrea itala, ktp. Krom tio unu knabo jam per si mem lernis Esperanton, kaj aligis al la grupo por kunesto kaj praktiko. La lernantoj ne ricevas lernej-krediton nun, sed per konsento de la lernejestro, oni esperas enmeti Esperanton officiale en la lernej-programon en la sekvonta jaro. La lernej-gazeto presis belan anoncon pri la nuna kurso kun la titolo, "Esperanto Club Study Language" (Esperanta Klubo Studas Lingvon).

**William Miernicki, Nov-Jorko**, altestimata membro nia dum pli ol dek jaroj, fidele sendis renovigan kotizon en junio antaŭ ol li vojagis al Pollando por viziti sian filinon tie. Lia frupago de kotizo, kaj membreco sen interrompo dum tiom da jaroj, multe helpas al EANA. Ni deziras por li ĝojan viziton kun la kara filino en Pollando, kaj ni esperas, ke nia samideano eble skribos ion por AE pri siaj spertoj en Eŭropo, post lia reveno al Usono.

**Jacques Gaucher, Kebeko, Kanado**, ĉiam estis la plej elstara Esperantisto en la provinco Kebeko, deposit lia unua interesigo pri la interlingvo antaŭ preskaŭ dek jaroj. Li instruis multajn kursojn, organizis klubon, kaj en la jaro 1958 li estris unu el la plej belaj EANA-kongresoj iam en Nord-Ameriko. S-ro Gaucher raportas, ke li ankoraŭ estas la Kebekan Flughavenon por la Trans-Kanada Aerlinio, kaj bone vivas kun la edzino Jocelyne, filino Linda, kaj eta filo Louis, en bela Kebeko.

**Julius Breitman, Nov-Jorko**, nia samideano dum dek-kvar jaroj, sendis bondezirojn al ni kaj EANA antaŭ nelonge, kaj sciigis nin, ke li revenis de vojaĝo kaj vizito al Israelo. Li raportas, ke nia *Esperanta Libro-Servo* en Nov-Jorko provizis Esperanto-librojn por la vojaĝo, kaj ke li fieris pri Israelo kaj Esperanto, kiam li promenadis sur Zamenhof-Strato en la urbo Rehov. Samideano Breitman unue trovis Esperanton en publika biblioteko en Nov-Jorko, en la libro *The Yiddish Esperanto Teacher* (La Juda Esperanto-Instruisto). En tiu tempo li praktikis kaj ĝuis Esperanton en la *Klubo Harmonio* kun la Esperantista geniulo samideano Klagin, kiu gvidis la klubon. Poste li aligis al EANA, kaj ni ofte renkontigis en la Centra Oficejo en Nov-Jorko.

**Lascario Barboza Aparicio, Kolombio, S.A.**, estas altestimata membro nia deposit li komencis lerni Esperanton antaŭ kvin jaroj. Ĉar li sciis la anglan lingvon, li trovis la libron *Esperanto: The World Interlanguage* satinda kaj utila. Je la komeco de 1963, li ricevis "Ateston pri Lernado" pro sukcesa ekzameno per koresponda kurso de la Argentina Esperanto-Lernejo en Rosario. Li nun estas tre kapabla kaj sperta Esperantisto. Interesa lingva komento lia, pri la lernado de Esperanto je alilingvulo, estas jene: "Mi preferus la anglan anstataŭ la hispanan metodon, pro la rilatoj de la idiomaj inter ambaŭ lingvoj."

**Helpu pri Kompilado de Vort-ofteco en Esperanto:** Dum multaj jaroj, aktiva Esperantisto kaj membro nia, *Walter A. Donner*, 17308 *Mapleboro Rd.*, *Maple Heights, Ohio 44137*, gvidis kürsojn, studis la movadon, kolektis librojn kaj gazetojn, ktp. Pri la frutempa letero de Zamenhof presita en May-Aug AE, li atentigas ke ĝi estis presita en januaro 1907, do la efektiva dato de ricevo sendube estis en la jaro 1906, – ne en 1907. Samideano Donner ankaŭ sendis liston de gazet-kolektoj, pri kiu ni esperas presi post esploroj en la Biblioteko. Sed li nun interesigas pri grava kompilado de *vort-ofteco en Esperanto* por la movado. Tio estas meritplena Esperanta klopodo, kaj li tre deziras ian ajn informon kaj helpon tiurilate. Li satus audi de legantoj de AE pri tiu temo.

**Sunshine Magazine** en la julia numero, presis vere tre bonan kaj tre sukcesan *Leteron al Redaktoro pri Esperanto*. La skribinto estas sperta propagandistino *Lillian E. Fuller*, kiu dum multaj jaroj sukcessis pri tiaj leteroj al gazetoj, kaj ankaŭ pri Esperanta propagando ĉiumaniere. "Lilio" ĉiam enmetis la adreson de EANA. Tio alportas multajn membrojn al EANA, kio signifas Esperantistigadon de multaj personoj.

**Fred E. Hutchins, Conn.**, veterano de EANA, kiu interesigas pri Esperanto ekde la jaro 1906, sendis al ni reklamon de "Drexel" pri nova bela meblokesto por televido nomita "Esperanto". S-ro Hutchins skribis: "Nenio kiel la uzo nun de nomo Esperanto en reklamoj okazis deposit la "Jakto ESPERANTO" en Nov-Angrujo." Ni jam presis pri aliaj mebloj de "Drexel" en Nov-Dec AE, 1963, kiu portis la nomon "Esperanto", sed jen nova utiligo por meblokesto por "TV". Ni nun esperu pri TV-disendoj en la Esperanta lingvo pere de la Esperanta TV-meblo.

**Ŝerco pri la Televido en USSR:** Unu el la hoteloj en Moskvo fiere fanfaronas, ke estas televido en ĉiu ĉambro, – sed Ĝi rigardas VIN.

**S-ino Marion Berney, Manitobo, Kanado**, estas unu el la plej helpemaj kaj samideanaj membroj de EANA. Ŝi estas Patrono dum dek jaroj; kontribuis al la Biblioteko ktp; aĉetis multajn librojn el nia libro-servo por sia Libraro; ĉiam interesigas pri la progreso de la Asocio; kaj sage kompresas pri la Neologisma Malsano en nia movado, kiel la jenaj komentoj pruvas: "Se Esperanto iam farigos nemanipulebla amaso de nenecesaj vortoj, ĝi eventuale malsukcesos. Superflueco estas konfuziga kaj senkuragiĝa al la lernanto, kiu unue estas allogita pro klaraj, koncizaj formoj. Mi esperas, ke ĝi neniam estos fuŝita de tiuj, kiu havas nenion alian plibonan por fari ol pendigi elkreskojn sur la strukturon de iu alia. Tiuj specoj estu sufokpremitaj per ilia propra multvorteco! – kaj preterlasu nian interlingvon. Nature okazos, mi opinias, malrapida, firma kaj konstanta evoluo de la interlingvo dum estontaj jaroj – kiel en iu ajn lingvo – pro disvolviĝo kaj progreso. Tio estos neevitebla kaj dezirinda, sed tiun 'novan diluvon' mi rezistas plej firme."

**S-ro Masashi Tominaga, Japanujo**, nia nova membro, estas tre sperta pri diversaj lingvoj kaj nun lernas Esperanton. Ni esperas, ke multaj usonanoj korespondos kun li (laŭ anono en Dez. Kor. en Maj-Aŭg AE). Li interesigas pri lingvistiko, muziko, literaturo, arto, ktp. Adresu lin: c/o *Sakai Works Nagoya Br., Azuma Bldg. 17, 4-chome, Horokojidori, Naka-ku, Nagoya City, Japan*. Li estas junu vic-direktoro de "Sakai".

# THE WORLD INTERLANGUAGE

Muriel Hammond

(Talented Blind Member of EANA)

Like wires and cables stretched from pole to pole,  
Or carefully protected underground  
To form a network, intricate but whole,  
Across a continent to carry sound;  
Or as a human hand alive with sense,  
Responding to another's friendly grip,  
Communicates a quick intelligence  
That welds the solid frame of fellowship;

So Esperanto leaps beyond the walls  
Surrounding those who know one tongue alone,  
Draws hearts together where its cadence falls,  
Conveys their thought with goodwill's overtone.  
Wherever it is used and understood,  
There Esperanto fosters brotherhood.

## DEZIRAS KORESPONDI

Anoncoj: Membroj senpage unufoje. Aliaj 4¢ ĉiu vorto aŭ mallongigo (resp. kup. valoras 8¢). Komerca anonco: 10¢ vorto, ripetado 6¢ vorto.

Germanujo. Esperantista Rondo Gimnazia, 313 Luchow, Gymnasium, Germany. Ses ĉarmaj 16-j. gimnazianinoj dez. kor. kun aliaj landoj.

Germanujo. S-ro Robert Gleich, Burweiler/Pfalz, Germany. 15 geknaboj 12-20-j., dez. kor. kaj inter. PM kun Esperantistoj tutmondaj.

Italujo. S-ro Karl-Heinz Renschler, Via Crisancio 171 f., Bari, Italy. Serĉas koresp. por 100 geknaboj (lernantoj de mezgrada lernejo) inter 11 kaj 14 jaroj. Krome por 15 plenkresk. 20-35-j. Respondoj garantitaj.

Koreujo. S-ro Byung Yeon Zeon, Ĝen. Sekretario de KEI, 107, 21-Ban, 5-Ka; Tae Pyung Dong; Taegu, South Korea. Li estas Ĝen. Sek. de Korea Esperanto-Instituto, kaj gvidas 50 gestudentojn el 3 altlernejoj, kiuj dez. kor. kun gesamideanoj en Usono, per ilust. PK, leteroj, ktp. Ili ankaŭ dankos pro sendajoj de Esp-gazetoj kaj aliaj Esperantajoj. Skribu multnombre al la junuloj pere de la Sekretario.

Usono. Duodecimal Society of America, 20 Carlton Pl., Staten Island 4, N. Y. Petu senpagan informon pri la "Duodecimal System", t.e. la 12-Bazo en nombroj, pezoj, kaj mezuroj. Oni skribas Esperante.

Usono. Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore., USA. Ni tre bezonas ekzempleron de "Literatura Mondo", Januaro 1933, por la EANA Biblioteko. Ni volonte pagos tre liberale per valoraj libroj aŭ/kaj ekzempleroj de AE, se vi povas provizi tiun "LM" aŭ la Biblioteko. Citu literaturon aŭ prezon deziratan.

### Sperta Traduka Servo – Esperanta-Angla aŭ Angla-Esperanta

INTERPARL, P.O. Box 213, Monroeville, Pennsylvania, USA. Ni tradukas resumojn, leterojn, artikolojn, librojn, de Esperanta en Anglan aŭ Angla en Esperantan. Teknika, komerca aŭ literatura temoj. Po \$3 por ĉiu 100 vortoj, po \$12 por ĉiu 1000 vortoj. Sperta kaj senerara servo.

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Esperanto Book Service, official book service of EANA, is fully equipped to supply ALL your book needs. Here are a few titles. Write to the address below for complete book lists. Place all your orders with the "Esperanto Book Service."*

ESPERANTO FOR BEGINNERS, Butler, easiest concise text, 28 p.....	\$ .15
THE ESPERANTO TEACHER, Stuttard, an excel low-cost textbook, 106 p.....	.50
POPULARA LERNOLIBRO, Kokeny, LEARNER'S AID, Dodge, excel set 2 bks:	
Best easy graded Reader; and English Key & Guide to Grammar, 106 p. SET	.70
ESSENTIAL ESPERANTO, Gething, good new standard textbook, 128 p..Cloth	2.50
STEP BY STEP IN ESPERANTO, Butler, easy "non-gram. method", 280 p. Cloth	1.85
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao, best, "6-bks-in-1", history, textbook, reader, directory, 2 dict. 245 p.....Cloth	3.50
NIXON ESPERANTO VOCABULARY, Eng-Esp & Esp-Eng, beginner dict. 178 p.	.75
EDINBURGH DICTIONARY, Esp-Eng & Eng-Esp, best handy dict. 300 p..Cloth	1.50
MILLIDGE DICTIONARY, Esperanto-English, best BIG Esp-Eng, 509 p...Cloth	2.50
FULCHER & LONG DICT, English-Esperanto, best BIG Eng-Esp, 352 p..Cloth	3.35
PLENA VORTARO DE ESP, all-Esp, with 'Suplemento', complete, 584 p..Cloth	3.35
TALKING YOUR WAY AROUND THE WORLD, Prof. Pei, account in Eng, 224 p.	.50
ONE LANGUAGE FOR THE WORLD, Prof. Pei, "how to achieve it", 307 p.Cloth	5.00
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Pei, all langs, incl. Esp. 663 p.....Cloth	6.75
SAY IT IN ESPERANTO, Connor, Eng & Esp, 1000 modern Esp phrases, 160 p.	.75
NAÜLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, Bastien, Esp & 8 langs, 334 p..Cloth	2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, Zamenhof, basic Esp vol, 442 p....Deluxe BD	3.50
LINGVO KAJ VIVO, Waringhien, "Esperantologaj Esoej", must, 452 p....Cloth	4.80
PLANLINGVAJ PROBLEMOJ, Gilbert, compares Esp. with "projects", 100 p..	1.25
ORA LIBRO DE ESP. MOVADO, richly ilust. bk of 1st 50 yrs of Esp, 240 p....	1.75
ESPERANTISMO, Braga, Esp miscellany, topics in best Esp style, 32 p.....	.25
VIVO DE ZAMENHOF, Privat, remarkable story of his life, ilust, 133 p....Cloth	1.15
LA SANKTA BIBLIO, "The best reader", bound in art vellum, 996 p.....Cloth	2.50
ESPERO INTERNACIA, 240 religious songs, full music notes, 230 p..Card BD	.75
KARLO, Privat, very popular easy first reader, life of young man, 47 p.....	.30
ESPERANTO-SORTIMENTO, good reading at low cost, 5 books, reg. 30¢ each:	
Akrobato, Blanche, Argenta Akvo, Miserere, Thais, Rozujo, over 200 p.....	1.00
TRI HOMOJ EN BOATO, Jerome, popular, easy, amusing, big novel, 258 p.....	1.50
PROVERBARO ESPERANTA, Zamenhof, with a full analytical index, 167 p....	1.70
MARIA KAJ LA GRUPO, Emba, excel orig novel re Marie & Esp Club, 172 p...	.85
MUZIK-NOTOJ, Baghy & Kalocsay, 10 songs, words & music complete, 34 p...	.35
ROMAJ ELEGIOJ & LA TAGLIBRO, Goethe (Kalocsay), amatory poems, 80 p..	.65
SVISA ANTOLOGIO, ed. Bauer, from 4 langs, top best anthology, BIG 540 p...	3.95
AMO EN LA JARO DEKMIL, Elola, novel, love's hidden power, 351 p....Bound	1.25
ANSTATAUA EDZINO, Maxwell, novel, love intrigue & escape, 212 p....Bound	1.15
ALASKA STAFETO (& Kaptitaj de la Glacirokoj), Omelka, excel, 96 p....Cloth	1.15
GÖSTA BERLING, Lagerlöf, exciting famed Swedish classic, 552 p.....Cloth	3.50
LA MARVIRINETO, Andersen's fairy tale, deluxe ilust LARGE, 78 big p.Cloth	2.40
LA VERDA RAKETO, Forge, 9 orig novels, some re Esperanto, 150 p.....Cloth	2.40
PORINFANA SERIO, 10 most beautiful illust. children's books, each 16 p.....	2.50
SET OF 20 RARE KEYS, unique large rare set of 20 different languages.....	3.00
YEARLY COLLECTIONS "AMERIKA ESPERANTISTO", complete, beginning 1944 to and including 1961 (except '48 and '59). Choose any 1 year, \$1.50; 3 or more years, ea. \$1.00; ALL 16 years complete since publication began, ea. 75¢ (only \$12 for A.L.). Magazines shipped fr. EANA office, Portland....12.00	
ENAMEL GREEN STAR, Esperanto insignia - button, brooch or tie pin, each..	.50
INDIAN BEAD STAR, truly a real 'jewel', orig \$1, 1 1/4" dia, safety catch.....	.85
ESPERANTO PENNANT, quality felt with Star & "Esperanto", 9" long 4" base	.30

**Esperanto Book Service, Williamsburg P.O. Box 315,  
Brooklyn, New York 11211**

## "SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5½ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

*It is a thoughtful, useful gift for friends, too!*

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only  
75¢

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Ass'n of N.A.* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Ass'n of N.A.* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

**Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore.**